

## Ni Kuiras

preparis Leston Buell

### 1. Demandoj

1. En nia urbo troviĝas restoracioj, kiuj proponas manĝaĵojn deversnaciajn. Kiunaciajn manĝaĵojn vi jam provis? Kiujn vi plej ŝatas? Kiujn vi malplej ŝatas?
2. Ĉu vi ofte kuiras? Ĉu vi ŝatas kuiri?
3. Kiam vi lastafoje preparis manĝaĵon por grupo da invititoj?
4. Kiel vi lernis la kuiradon?
5. Kiam vi estis infano, ĉu vi foje devis prepari manĝan por vi mem? Por aliaj familianoj?
6. Kiun manĝaĵon vi plej bone preparas?
7. Kiuj estas la ĉefaj aferoj, kiuj troviĝas en kuirejo?
8. Kiel ofte vi iras al vendejo por aĉeti manĝaĵojn? Ĉu vi emas aĉeti diversajn aferojn en diversaj vendejoj?
9. Ĉu vi iam vizitis unu el la « bazarojn de la kultivistoj », kiuj okazas ĉiusemajne en diversaj lokoj en nia urbo?
10. Ekspliku al la grupo kiel prepari iun ajn manĝaĵon, kiun vi scipovas fari. Se vi estas tute ne kuirema, vi povas elekti tre simplan aferon tian, kiel sandviĉon aŭ tason da teo. Tamen, vi devas priskribi ĉiun etapon. Vi nepre devos ekcerti, ke vi konas ĉiujn verbojn kaj substantivojn en Esperanto, kiujn vi bezonos. Personoj pli kuiremaj povas elekti manĝaĵon pli komplikan.
11. Imagu, ke vi estas profesia kuiristo. Kiuj aspektoj de tiu laboro plaĉus al vi kaj kiuj ne plaĉus al vi? Kiuj estas la plej malfacilaj aspektoj de tiu profesio?
12. Ĉu vi iam provis prepari recepton, kiun vi trovis en fremdlanda libro aŭ kiun donis al vi framdlandano? Kiujn malfacilaĵojn vi trovis en la realigado de la recepto?

## 2. Utilaj Vortoj

Jen kelkaj vortoj (verdire, iom pli ol nur kelkaj), kiuj utilos dum ni babilos kune pri la kuirado kaj la kuirejo. Mi ne supozas, ke ĉiuj parkerigos ĉiujn vortojn!

kuri <i>cook</i>	spinaco <i>spinach</i>
kuirejo <i>kitchen</i>	maizo <i>corn, maize</i>
fridujo <i>refrigerator</i>	tritiko <i>wheat</i>
frostujo, frostigilo <i>freezer</i>	rafano <i>radish</i>
bakujo <i>oven</i>	citrono <i>lemon</i>
fornelo <i>stove</i>	limedo <i>lime</i>
tablo <i>counter, table</i>	napo <i>turnip</i>
kirlilo, ŝaŭmigilo <i>mixer</i>	terpomo <i>potato</i>
miksilo, likvigilo <i>blender</i>	kukurbeto <i>zucchini</i>
lavkuvo, lavujo, lavabo <i>sink</i>	kapsiko, papriko <i>pepper (red, green, etc.)</i>
bovlo <i>bowl</i>	
pato <i>pan</i>	faruno <i>flour</i>
kaserolo <i>small pot, sauce pan</i>	rizo <i>rice</i>
pleto <i>pladder</i>	nudeloj, spagetoj, vermiĉeloj
breto <i>shelf</i>	farĉo <i>stuffing</i>
trupelvo <i>colander</i>	pasteĉo <i>pie, etc.</i>
	bulko <i>roll</i>
pizo <i>peas</i>	kuko <i>cake</i>
karoto <i>carrot</i>	biskvito <i>cookie</i>
fabo <i>bean</i>	
fazeolo <i>green bean</i>	nukso <i>nut</i>
brasiko <i>cabbage</i>	araĥiso <i>peanut</i>
florbrasiko <i>cauliflower</i>	migdalo <i>almond</i>
laktuko <i>lettuce</i>	avelo <i>hazelnut</i>
celerio <i>celery</i>	juglando <i>walnut</i>
kukumo <i>cucumber</i>	
agariko <i>mushroom</i>	butero, lakto, kremo, fromaĝo
cepo <i>onion</i>	jogurto <i>yoghurt</i>
poreo <i>leek</i>	

viando, kok(aĵ)o, pork(aĵ)o	pasto <i>dough</i>
meleandr(aĵ)o <i>turkey</i>	
ŝafa(aĵ)o <i>lamb</i>	recepto <i>recipe</i>
kapr(aĵ)o <i>goat</i>	
anas(aĵ)o <i>duck</i>	kuri, baki, rosti, boligi, rosti, friti
anser(aĵ)o <i>goose</i>	senŝenligi <i>peel</i>
	bolkuiri <i>boil</i>
spico, salo, pipro	kradrosti <i>grill</i>
kreno <i>horseradish</i>	frostigi <i>freeze</i>
mustardo <i>mustard</i>	glaciigi <i>freeze</i>
ajlo <i>garlic</i>	kirli <i>stir, beat</i>
zingibro <i>ginger</i>	tranĉi <i>cut</i>
oleo <i>oil</i>	verŝi <i>pour (a liquid)</i>
graso <i>grease</i>	ŝuti <i>pour (a solid)</i>
vinagro <i>vinager</i>	haki <i>chop</i>
	farĉi <i>stuff</i>
tranĉilo, forko, kulero, telero	knedi <i>knead</i>
	kribri <i>strain</i>
plado, saŭco	ĉerpi <i>serve, dish out, ladle out</i>

### 3. Lingvaj Rimarkoj

*Telero. Plado.* Vi manĝas el *telero*. Se vi preparas tutan meleandron por viaj gastoj, vi metos ĝin sur grandan *pladon* meze de la tablo, kaj ĉiu gasto nur prenos pecon de ĝi sur sian teleron. *Plado* havas ankaŭ alian signifon: ĉiu el la diversaj manĝaĵoj, kiuj konsistigas menuon. Ekzemple, tri *pladoj*, kiujn oni tradicie preparas en egiptaj hejmoj estas farĉitaj vinberfolioj, verdaj fazeoloj kun tomatoj kaj viando, kaj lentsupo.

#### 4. Ekzercoj

**Ekzerco 1.** En kiu kvaropo de vortoj, troviĝas unu vorto kiu ne logike apartenas al la grupo. Trovu tiun vorton kaj ekspliku kial ĝi ne similas al la aliaj vortoj.

1. avelo, juglando, ajlo, migdalo
2. agariko, napo, karoto, rafano
3. meleandro, kapsiko, anaso, ansero
4. kreno, poreo, mustardo, majonezo
5. tranĉilo, forko, kulero, fornelo
6. limedo, citrono, arafiso, orangô
7. cepo, laktuko, brasiko, spinaco
8. bulko, kuko, pano, faruno
9. maizo, terpomo, tritiko, rizo
10. verŝi, ŝuti, ĉerpi, kirli

**Ekzerco 2.** Elektu taŭgan objekton por ĉiu el la sekvantaj verboj.

1. boligi akvon, ovon, panon
2. senŝeligi spinacon, kaserolon, arafison
3. bolkuiri biskviton, ovon, farunon
4. kirli kremon, pasteĉon, juglandon
5. knedi fazeolon, paston, poreon
6. ĉerpi arafison, teleron, supon
7. verŝi kukumon, fromaĝon, teon
8. ŝuti tritikon, sukon, bakujon
9. haki pizon, cepon, grason
10. kradrosti krenon, migdalon, fiŝon
11. farĉi meleandron, zingibron, avelon

**Ekzerco 3.** Elektu la korektan formon: *kiu, kiuj, kiun, kiujn*.

1. La pomoj, \_\_\_\_\_ plej taŭgas por tiu recepto haveblas nur en aŭtuno.
2. La suko, \_\_\_\_\_ vi preparis estas tro dolĉa.
3. Jen la juglandoj, \_\_\_\_\_ ni devas senŝeligi.
4. Kie vi metis la tranĉilon, per \_\_\_\_\_ ni tranĉas la panon?
5. La ovojn, \_\_\_\_\_ mi jam bolkuiris, mi metis en la tirkeston de la fridujo.

6. La kuko, \_\_\_\_\_ plej bongustas, estas tiu, \_\_\_\_\_ preparas mia onklino.
7. La spico, \_\_\_\_\_ mi bezonas por tiu recepto, haveblas nur en iranaj manĝaĵvendejoj.
8. Granda plado, sur \_\_\_\_\_ oni metas, ekz. la tekruĉon, la sukerujon, la kremkruĉeton, la tasojn, la subtasojn kaj la kulerojn, nomiĝas en Esperanto « pleto ».
9. La citronoj, \_\_\_\_\_ oni kultivas en Egiptio, estas pli malgrandaj ol tiuj de ĉe ni.
10. La faruno, \_\_\_\_\_ mi trovis en via ŝranko malbonodoras.
11. Mi ĵetis en la rubujon la spagetojn, \_\_\_\_\_ vi preparis antaŭ semajno.